

Sten Johansson

LA KRIMO DE KATRINA

Facila rakonto



La Krimo de Katrina

Unua rakonto pri Katrina

Facila rakonto kun klarigoj de la malfacilaj vortoj

kun aldonoj en la angla kaj korea lingvoj

Originale verkis Sten JOHANSSON

Glosis en la angla lingvo la aŭtoro

kaj Edmund GRIMLEY EVANS

Glosis en la korea lingvo L E E J u n g k e e

Unua eldono: Al-fab-et-o, Skövde, Svedio, 2001

Tria eldono: Seula Esperanto-Kulturcentro

Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj ĉe la aŭtoro kaj la eldonisto

Distribuas: Seula Esperanto-Kulturcentro

#601 Myungdong Doms, 305, Samil-daero, Jung-gu,

Seulo, 04537, Koreio (010-3340-5936)

Retpoŝto: leejungkee@khu.ac.kr

Presita en Seulo, Koreio

Sten Johansson

LA KRIMO DE KATRINA

Facila rakonto

Tria eldono

Seula Esperanto-Kulturcentro

Enhavo	Paĝo
1. Vagonaro al sudo	3
2. Sur la maro	6
3. Kiu malaperis?	8
4. Pli da kafo	12
5. Ekskurso al strando	16
6. La rakonto de Bruno	19
7. En urbeto.....	23
8. Fantazia cigano	26
9. La krimo de Katrina.....	29
10. Reen al nordo	35
 Teknika postklarigo por instruantoj.....	 37

1. Vagonaro al sudo

Katrina sidas en vagono. La vagonaro iras al sudo. Katrino rigardas tra fenestro. Estas somero. Ŝi vidas arbojn kaj klaran ĉielon. La suno brilas. La vagonaro iras tra arbaro. Estas suna somera tago, kaj Katrino ĝojas.

Ŝi pensas pri Bruno. Ŝi vojaĝas per vagonaro al Bruno. Li estas amiko. Tre bona amiko. Katrino rigardas tra la fenestro kaj vidas arbaron, domon, aŭton. Ŝi fermas la okulojn kaj vidas Brunon. Li ridetas kaj diras: “Saluton, Katrino! Bonvenon al Germanio!”

Ŝi malfermas la okulojn kaj ne vidas Brunon. Li ne estas en la vagonaro. Li estas en Germanio, kaj en ŝia memoro.

La vagonaro iras plu al sudo. Ĝi iras tra granda arbaro en Svedio. Katrino vojaĝas de Svedio al Germanio. Bruno estas germano, li loĝas en Germanio, en Berlino. Sed Katrino estas svedino, ŝi loĝas en Svedio. Ŝi estas studentino, ŝi studas en Gotenburgo. Sed nun estas somero, kaj ŝi estas libera. Katrino estas libera vojaĝi, kaj ŝi ĝojas vojaĝi al sudo, al Bruno.

Nun la vagonaro iras tra urbeto. Ŝi vidas multajn domojn, aŭtojn kaj homojn. Sed la vagonaro ne haltas. Ĝi estas rapida vagonaro. Ĝi ne haltas en urbetoj.

Katrino ekstaras kaj iras ĝis la kafeja vagono. Ŝi aĉetas kafon kaj buterpanon. Ŝi eksidas ĉe tablo, trinkas la kafon kaj manĝas la buterpanon. Katrino fermas la okulojn kaj revidas Brunon. Li ridetas kaj diras: “Mi amas vin!” Lia voĉo estas tre klara. Sed nun ŝi aŭdas voĉon de virino. La virino diras: “Kaj mi amas vin!”

Katrino malfermas la okulojn. Ŝi ne plu ĝojas. “Stulta fantazio!” ŝi pensas. Sed nun ŝi ekvidas du homojn ĉe alia tablo.

Viron kaj virinon. Ili rigardas unu la alian. Ili ridetas unu al la alia. Ili diras unu al la alia: “Mi amas vin!”

Nun ankaŭ Katrina ridetas. Tio ne estis stulta fantazio. La voĉo ne estis la voĉo de Bruno. Ŝi ne aŭdis Brunon kaj alian virinon. Ŝi aŭdis du aliajn homojn en la vagono. Du homojn ĉe alia tablo. Ili parolas unu kun la alia. Ili amas unu la alian.

Ĉu Katrina amas Brunon? Eble. Ŝi ne scias. Ŝi ne konas lin tre bone. Ili estas bonaj amikoj, sed ili ne bone konas unu la alian. Ŝi ekkonis lin antaŭ unu jaro. Ŝi renkontis lin en festivalo. Li plaĉis al ŝi. Kaj ankaŭ ŝi plaĉis al li. Poste ili sendis leterojn unu al la alia. Ili estas leter-amikoj.

Nun Katrina vojaĝas al Germanio por revidi Brunon. Ŝi ĝojas iri al li. Ŝi iras al sudo per rapida vagonaro, sed por Katrina la vagonaro estas malrapida.

Glosoj: / esperante / *angle* / koree

(Literoj ^{A-F} montras oftecon de la radiko; ^A = plej ofta, ^F = plej malofta.)
aŭto ^B= aŭtomobilo / *car* / 자동차

Berlino ^Eĉefurbo de Germanio (*Berlin*) / *Berlin* / 베를린

butero ^Ĉgraso el lakto / *butter* / 버터

fantazio ^Dkaprica elpensajo / *fantasy* / 환상, 공상

festivalo ^Ĉfesta, distra aranĝo / *festival* / 축제

Gotenburgo ^Fdua urbo de Svedio (*Göteborg*) / *Gothenburg* /
고텐부르크

kaf-ejo ^Cejo por manĝeti, trinki kafon kaj alion / *café* /
카페, 커피숍

kafo ^Cnigra varma trinkaĵo / *coffee* / 커피

studento ^Dhomo, kiu studas ĉe universitato / *student* / 대학생

studi ^Blernadi / *study* / 공부하다

stulta ^C.....nebone pensanta, malinteligenta / *stupid* / 어리석은,
바보스런
unu la alian.....= ŝi lin kaj li ŝin / *one another* / 서로 서로
vagon-aro ^C.....veturilo el kelkaj vagonoj sur fervojo / *train* / 열차

2. Sur la maro

Nun estas vespero. La vagono de Katrina nun staras sur granda ŝipo. La ŝipo ekiras de Svedio. Ĝi iras al sudo sur la maro. Estas bela somera vespero. Ne estas forta vento.

Katrina povas dormi en la vagono. Sed ŝi ne volas dormi, ŝi ne estas dormema. Ŝi iras supren en la granda ŝipo. Ŝi vidas la grandan maron en sudo. En nordo ŝi vidas la teron de Svedio. La tero jam estas malproksima. En okcidento la suno subiras, kaj la ĉielo estas tute ruĝa. Katrina staras ĉe la ŝiprando. Ŝi rigardas la sunsubiron.

“Bela, ĉu ne?” diras viro apud ŝi.

Katrina rigardas lin. Ŝi ne konas lin, sed ŝi respondas:

“Jes, la sunsubiro estas belega!”

“Sur la maro la suno ĉiam bele subiras”, li diras.

“Ĉu ankaŭ en ŝtormo?” demandas Katrina.

La viro pensas, kaj poste diras:

“Nu, eble ne en ŝtormo. Sed hodiaŭ ne estas ŝtormo. Estas tre malforta vento.”

Post iom da tempo li diras:

“Mi nomiĝas Fredrik.”

“Mi estas Katrina”, ŝi respondas kun eta kapsaluto.

“Ĉu vi volas vespermanĝi kun mi, Katrina?” li nun demandas.
“Aŭ ĉu vi jam manĝis?”

“Dankon, sed mi ne emas manĝi. Mi ne estas malsata”, respondas Katrina.

“Sed eble glason da vino? Ĉu vi ŝatas vinon?”

“Bone do. Etan glason”, diras Katrina.



La ŝipo iras malrapide al sudo, kaj nun la okcidenta ĉielo havas violan koloron. En oriento la ĉielo jam estas nigra. Katrina kaj Fredrik sidas en la restoracio de la ŝipo. Ili parolas pri negravaj aferoj. La motoroj de la ŝipo zumas. Estas agrabla vespero.

“Ĉu ankoraŭ glaseton?” demandas Fredrik.

“Ne, dankon. Sufiĉas”, diras Katrina. “Mi volas iomete dormi. Bonan nokton kaj ĝis revido!”

“Ĝis revido, Katrina!”

Glosoj:

kap-saluto ^{DB}saluto per kapo / *nod (in greeting)* / 머리숙여 인사하다

motoro ^Ĉaparato por movi / *motor* / 모터

nom-iĝi ^A Xhavi la nomon X / *be called X* /

X 라고 불리어지다

okcidento ^Cdirekto al la sunsubiro / *west* / 서쪽

oriento ^Cmal-okcidenta / *east* / 동쪽

rando ^Climo, bordo, ekstera linio / *edge* / 변두리

restoracio ^Dejo, kie oni manĝas kontraŭ pago / *restaurant* /

레스토랑

sun-sub-iro ^{BA}tempo, kiam la suno iras suben vespere / *sunset* / 일몰

ŝip-rando ^{BC}rando de ŝipo / *rail (of a ship)* / 배 가장자리

ŝtormo ^Dtre forta vento / *storm* / 폭풍

violo ^Druĝ-blua floro / *violet* / 제비꽃, 오랑캐꽃

zumi ^Daŭdigi sonon “zzzzz” / *buzz* / 웅웅거리다

3. Kiu malaperis?

Estas frua mateno en Berlino. Bruno frue ellitiĝis por renkonti Katrinan en la stacidomo. Li atendas sur la kajo. La vagonaro estas malfrua. Oni informas, ke ĝi malfruas tridek minutojn. Bruno iras trinki tason da kafo. Li estas tre dormema, sed la kafo vekas lin. Poste li reiras al la kajo. Nun la vagonaro el Svedio alvenas. Bruno atendas Katrinan ĉe la fino de la kajo. Li ne scias la numeron de ŝia vagono. Kie ŝi aperos? Kie ŝi elvagoniĝos? Estas multe da homoj sur la kajo. Multaj homoj vojaĝis per la vagonaro kaj nun iras sur la kajo. Aliaj venis por renkonti iun, same kiel Bruno venis por renkonti Katrinan.

Post dek minutoj la vagonaro denove ekiras. Ĝi pluiras al alia stacio. Nun jam estas malmulte da homoj sur la kajo. Sed Katrina ne estas tie. Ŝi ne aperis! Ŝi ne elvagoniĝis. Katrina malaperis!

Bruno atendas ankoraŭ dek minutojn. Nun la kajo estas senhoma.

Kio okazis al Katrina? Bruno estas maltrankvila, sed li ne scias, kion fari. Ĉu io okazis al ŝi en Svedio? Ĉu ŝi ne ekiris per la vagonaro? Jes, certe ŝi ekiris. Katrina ne telefonis al li. Do certe nenio okazis al ŝi en Svedio.

Ĉu do io okazis dum la vojaĝo? En la vagonaro? En la ŝipo? Aŭ ĉu ŝi forgesis elvagoniĝi? Eble ankaŭ Katrina estas dormema. Eble nun ŝi trankvile dormas plu en la vagono. Sed ŝi devus vekigi, kiam la vagonaro haltis! Estis multege da bruoj. Ĉu eblas dormi plu en tia bruoj?

Eble ŝi renkontis iun en la vagonaro aŭ en la ŝipo. Eble iu viro ekparolis al ŝi. Katrina estas iomete naiva, pensas Bruno. Ŝi ne

komprenas la danĝerojn dum vojaĝoj. Li komencas timi, ke io malbona okazis al ŝi.

Bruno ne scias, kion fari. Fine, post longa atendo, li reiras hejmen. Li telefonas al la numero de Katrina en Svedio, sed neniuj respondas. Kie ŝi estas?



Katrina dormas kaj sonĝas pri Bruno. Ŝi sonĝas, ke ili dancas. En la festivalo antaŭ unu jaro ili dancis, kaj same nun en la sonĝo. En la festivalo li kisis ŝin, kaj same nun, en la sonĝo. Estas longa danco kaj longa kiso. Sed subite io okazas. Estas laŭta bruoj kaj forta skuo. Ŝi falas. Ne, en la festivalo ŝi ne falis, sed en la sonĝo. Ŝi falas, kaj Bruno malaperas. Ĉio estas nigra, malluma. Ŝi ne plu estas en la sonĝo. Kie ŝi estas? Ŝi vidas nenion. Ŝi timas.

Katrina sidiĝas sur la lito, sed la plafono frapas ŝian kapon. Aj! Kio okazis? Ŝi serĉas per la mano por palpi la plankon. Sed ne plu estas planko! Ĉio estas nigra, ŝi aŭdas timigan bruon, ŝia lito skuigas, la plafono falis, ne plu estas planko sub ŝia lito. Kio okazis? Ĉu la fino de la mondo?

Katrina denove palpas sub la lito. Subite ŝi trovas ion. Ion molan! Vizagon kun barbo! Iu barba viro kuŝas sub ŝia lito! Katrina krias!

La viro sub ŝia lito eklumigas lampeton. Ĉio timiga malaperas. Ŝi kuŝas en vagono, en kuŝvagono. La ŝipo kun ŝia vagono alvenis al haveno en Germanio, kaj la vagono skuigas kun laŭta bruoj. Sub ŝi viro rigardas ŝin maltrankvile. Super ŝi virino rigardas ŝin, same maltrankvile.

”Pardonu min”, diras Katrina. “Mi sonĝis.”

Poste ŝi dormas plu. La vagonaro iras tra Germanio, kaj Katrina dormas trankvile. Fine ŝi vekigas. La vagonaro haltas en

Berlino, kaj nun ŝi staras en la stacidomo. Sed kie estas Bruno? Ĉu li forgesis ŝin? Ĉu li malaperis?

Glosoj:

- aj! ^Eekkrio pro doloro / *ouch!* / 고통스런 외침 !
- barbo ^Ĉharoj sub la buŝo de viro / *beard* / 수염
- danci ^Cmovi sin ritme laŭ muziko / *dance* / 춤추다
- danĝero ^Ckio povas kaŭzi malbonon / *danger* / 위험
- de-nove ^Aree, ankoraŭ fojon / *again* / 또 다시
- ek-lum-igi ^Bfari tiel, ke io komencas lumi / *turn on the light* / 불을 밝히다
- el-lit-iĝi ^Bekstari kaj iri el la lito / *get out of bed* / 기상하다
- el-vagon-iĝi ^Ciri el la vagono / *get out of the train* / 열차에서 내리다
- haveno ^Ĉloko, kie ŝipoj albordiĝas / *harbour* / 항구
- kajo ^Estrato aŭ irejo ĉe la akvo en haveno aŭ apud fervojo
en stacio / *quay, platform* / 부두, 플랫폼
- kisi ^Ctuŝi iun per la lipoj / *kiss* / 키스하다
- kuŝ-vagono ^{BC}fervoja vagono, kie eblas simple kuŝi (kaj dormi) /
courette / 침대열차
- lampo ^Ĉlumigilo / *lamp* / (전)등, 램프
- laŭta ^Cforte sonanta / *loud* / 큰소리의, 고성의
- mola ^Ĉne rezista al premo / *soft* / 부드러운
- naiva ^Dtro kredema, infaneca / *naive* / 순진한
- palpi ^Ĉprovi senti per la fingroj aŭ mano / *feel, touch* / 더듬다
- plafono ^Ĉsupra ebeno de ĉambro / *ceiling* / 천정
- plu-iri ^Airi pluen / *go on* / 계속해서 가다
- skui ^Ĉsubite, forte movi ion tien-reen / *shake* / 흔들다

sku-iĝi Ĉmoviĝi pro skuado / *shake, shiver* / 흔들리다
 sonĝi Ĉfantazie sperti dum dormo / *dream* / 꿈꾸다
 subite^Btuj, rapide, neatendite / *suddenly* /
 급히, 갑자기
 taso Ĉeta trinkujo kun tenilo / *cup* /
 (손잡이 달린) 찻잔

4. Pli da kafo

Bruno estas hejme. Li maltrankvilas pri Katrina. Kie ŝi estas? Kio okazis? Li ne scias, kion fari.

Subite iu sonorigas ĉe la pordo. Bruno malfermas ĝin. Ekster la pordo staras – Katrina! Kia ĝojo! Ŝi ne malaperis! Aŭ – ŝi ja malaperis, sed nun ŝi reaperas.

Bruno brakumas ŝin. Li diras “bonvenon!” Sed li ne kisas ŝin. Kial ne?

“Bonvolu veni en la ĉambron!” diras Bruno. “Kie vi estis? Kio okazis? Mi atendis vin en la stacidomo, sur la kajo. Sed vi ne venis...”

Katrina iras en la ĉambron. Tie estas virino. Alia juna virino. Bruno diras al Katrina:

“Jen Franciska, mia amikino.”

Kaj al Franciska, la alia virino, li diras:

“Jen Katrina el Svedio. Ŝi malaperis, sed nun... fino bona, ĉio bona!”

“Ĉu fino bona?” pensas Katrina. Ŝi salutas Franciskan. Bruno ne diris “jen mia amikino Katrina”. Nek “jen Franciska el Germanio”. Katrina estas el Svedio, kaj Franciska estas amikino. Katrina nenion komprenas. Ŝi ne sciis, ke Franciska estas amikino de Bruno. Ŝi eĉ ne sciis, ke Franciska ekzistas. Bruno nenion diris pri ŝi. Kial ne?

Nun Bruno denove demandas ŝin:

“Kie vi estis? Kio okazis?”

“Nenio okazis”, diras Katrina kun stranga sento. Ŝi havas senton de malvarmego en la brusto. “Nenio. Mi elvagoniĝis kaj iris

en la stacidomon, sed vi ne estis tie. Kie vi estis? Ĉu vi forgesis min?”

“Kompreneble mi ne forgesis vin”, diras Bruno. “Mi ja estis tie! Sed mi ne vidis vin.”

Nun Franciska ekparolas.

“Pardonu”, ŝi diras al Katrina, “en kiu stacio vi elvagoniĝis?”

Katrina pripensas iomete kaj diras:

“En la ĉefa, mi pensas. *Berlin Zoo*.”

Franciska ekridas, sed Bruno metas la manojn al la kapo kaj diras:

“Ĉu mi forgesis diri, ke vi devas elvagoniĝi ĉe la Orienta stacio?”

Katrina rigardas lin. Ŝi rigardas ankaŭ Franciskan, la amikinin. Franciska estas blonda kun longaj haroj kaj molaj formoj. Katrina estas maldika kaj havas mallongajn brunajn harojn. Bruno estas alta, maldika, kun brunaj haroj kaj barbeteto. Katrina diras:

“Mi ne scias. Eble vi diris tion. Mi ne memoras. Nu, tio ne plu gravas. Nun mi estas ĉi tie, ĉu ne? Mi alvenis. Ĉu mi povus havi tason da kafo?”

“Kompreneble”, diras Bruno, “ni matenmanĝu!”

Ili ĉiuj iras en la malgrandan kuirejon. Franciska ekigas kafaparaton kaj surtabligas buteron. Ĉio cetera jam troviĝas sur la tablo. Katrina rigardas Franciskan kaj pensas: “ĉu ŝi loĝas ĉi tie?”

“Bonvolu sidiĝi, Katrina!” diras Bruno kaj mem sidiĝas ĉe la tablo. “Mi timis, ke io malbona okazis al vi en la vojaĝo. Mi tre ĝojas, ke ne! Sed kiel vi trovis nian loĝejon?”

Katrina rigardas lin kaj Franciskan. Ĉu li diris “mian” aŭ “nian loĝejon”? Ŝi respondas:

“Nu, ne estis tre malfacile. En la stacidomo mi demandis en informejo, poste mi iris per urba vagonaro, kaj denove demandis pri via adreso. Fine iu viro eĉ iris kun mi por montri la ĝustan domon.”

“Strange!” diras Franciska. “Kutime la berlinanoj ne estas tiel bonvolaj. Ne al mi!”

“Ĉu vi mem ne estas berlinanino?” demandas Katrina. Eble Franciska tamen ne loĝas ĉi tie kun Bruno?

“Nun mi ja loĝas ĉi tie”, respondas Franciska kaj alportas la kafon. “Sed antaŭe ne. Mi naskiĝis en urbeto.”

“Eble ili aŭdis, ke vi ne estas germanino”, diras Bruno al Katrina.

“Kompreneble. Mi tre malbone parolas germane”, ŝi respondas.

“Ne gravas. Ni ĉiuj parolas Esperanton”, diras Bruno.

“Bonege”, diras Katrina. “Germane mi eĉ ne scias, kiel peti pli da kafo. Sed Esperante tio estas facila. Ĉu mi povus havi iom pli da kafo, mi petas?”

“Bonvolu”, diras Franciska kaj plenigas la tason de Katrina la duan fojon.

Glosoj:

berlin-ano ^E.....ano de Berlino / *Berliner* / 베를린 시민

blonda ^Ĉ.....kun helaj haroj / *blond* / 금발의

brak-umi ^B.....ĉirkaŭbraki, meti la brakojn ĉirkaŭ iu / *hug, embrace* /
포옹하다, 껴안다

brusto ^C.....korpoparto inter ventro kaj kolo / *breast, chest* / 가슴

ek-igi.....fari tiel, ke io komencas agi / *start* /
작동시키다

Esperant-een Esperanto / *in Esperanto* / 에스페란토로
 german-e ^Ĉen la germana lingvo / *in German* / 독일어로
 kaf-aparato ^Celektra ilo por kuiri kafon / *coffee percolator* /
 커피 기구
 mal-trankvili ^Besti maltrankvila / *worry* / 불안해하다
 sonoro ^Ĉdaŭra sono, tono, / *ringing* / 소리, 음향
 stranga ^Bmiriga, ne normala / *strange* / 이상한
 sur-tabl-igi ^Ĉmeti sur la tablon / *put on the table* / 탁자위에 놓다
 trov-iĝi ^Aesti, ekzisti, havi lokon ie / *be found, exist* /
 발견되다, 있다.

5. Ekskurso al strando

“Ĉu vi volas hodiaŭ fari ekskurson?” demandas Bruno.

Jam pasis kelkaj tagoj, de kiam Katrina alvenis. Kaj noktoj. Nokte Katrina dormas en la granda ĉambro, dum Bruno kaj Franciska malaperas en la dormoĉambron.

“Jes, kial ne?” diras Katrina. “Kien ni iru?”

“Nu, hodiaŭ estas varme, kaj oni promesis sunon dum la tuta tago”, diras Bruno. “Do, eble ni iru por naĝi en lago?”

“Volonte”, diras Katrina. “Sed ĉu estas malproksime?”

“Ne, ne tre. Estas en Berlino.”

“Ĉu estas lago en Berlino?”

“Certe. Eĉ estas kelkaj lagoj. Bedaŭrinde Franciska ne povas kuniri. Ŝi devas labori.”

“Ho, bedaŭrinde!” diras Katrina. Sed vere ŝi ne tre bedaŭras tion. Franciska estas simpatia, sed Katrina preferas esti sola kun Bruno.

“Do, ni iros per urba vagonaro”, diras Bruno. “Franciska iros per la aŭto al la laborejo.”

“En ordo”, respondas Katrina.

Katrina kaj Bruno pasigas tre agrablan tagon sur strando. Ili ludas, naĝas, manĝas en restoracio, kaj poste ili luas vel-tabulon kaj provas veli per ĝi. Unue Bruno provas, kaj Katrina rigardas lin. Ŝi staras apud li, en la akvo. Poste Katrina provas veli. Ili falas en la akvon proksimume cent fojojn, sed tio ne gravas. La akvo estas varma kaj la suno brilas. Post ĉiu falo ili ridegas. Kiam Bruno falas de la tabulo kaj enakviĝas, Katrina ridas tiel, ke ankaŭ ŝi falas en la akvon.

Poste ili ripozas en la suno. La suno brilas forte, kaj Katrina petas Brunon helpi ŝin ŝmiri sunprotektan kremon sur la dorso.

Vespere ili reiras per la urba vagonaro tra la urbego Berlino. La lago estas en la okcidenta parto, kaj la hejmo de Bruno en la orienta. Ili sufiĉe longe veturas. Katrina estas tiel laca, ke ŝi preskaŭ ekdormas sur la brako de Bruno. Sed fine ili venas al la ĝusta stacio kaj devas elvagoniĝi. Kiam ili venas al la loĝejo, Franciska jam estas hejme.

Bruno kaj Katrina estas lacaj kaj ĝojaj. Ankaŭ Franciska estas laca post la laborado, sed eble ne same ĝoja.

Vespere la haŭto de Katrina estas tute ruĝa, kaj ĝi brulas. Ŝi ŝmiras haŭtkremon sur la brakojn kaj bruston. Ŝi ŝatus peti, ke Bruno ŝmiru al ŝi la dorson. Sed kiam ŝi vidas la okulojn de Franciska, ŝi ne kuraĝas peti lin.

Glosoj:

bedaŭr-inda ^C	tia, ke oni devas bedaŭri, malĝoji pri ĝi / <i>regrettable, unfortunate</i> / 유감스러운
dorso ^C	malantaŭa parto de la korpo / <i>back</i> / 등, 배부(背部)
en-akv-iĝi ^B	veni en la akvon / <i>get into the water</i> / 잠수하다
haŭto ^C	ekstero, surfaco de korpo / <i>skin</i> / 피부, 살갗
kremono ^D	grasa parto de lakto; ŝmiraĵo / <i>cream</i> / 크림, 유지(乳脂)
laca ^C	sen-forta, ripozema / <i>tired</i> / 피곤한
lui ^Ĉ	pagi por uzi dum difinita tempo / <i>hire, rent</i> / 빌리다
pas-igi ^B	fari ion, dum pasas difinita tempo / <i>spend</i> / 보내다
proksim-ume ^A	ne precize / <i>approximately</i> / 대략
promesi ^C	diri, ke oni certe faros ion / <i>promise</i> / 약속하다
protekti ^Ĉ	ŝirmi, helpi kontraŭ io / <i>protect</i> / 보호하다
ŝmiri ^D	surmeti ion molan kovrante ion / <i>spread, smear</i> / 바르다, 칠하다

simpatia Ĉ	plaĉa, vekanta favoran inklinon / <i>nice, likable</i> / 호감이 가는
strando E	parto de mara aŭ laga bordo, kie konvenas bani sin / <i>beach</i> / 해변, 바닷가
veli Ĉ	veturi per helpo de velo/ <i>sail</i> / 돛을 달고 항해하다 서핑하다
velo Ĉ	tolo, kiu per la vento pelas boaton / <i>sail</i> / 돛
vel-tabulo ĈC	tabulo kun masto kaj velo por unu homo / <i>windsurfing</i> <i>board</i> / 윈드서핑 보드
volonte Ĉ	pro libera volo, kun ĝojo, ne devigite / <i>gladly</i> / 기꺼이

6. La rakonto de Bruno

Franciska, Katrina kaj Bruno sidas en la granda ĉambro. Ili trinkas bieron kaj babilas. Estas vespero. Hodiaŭ estis malbona vetero, kaj Katrina vizitis muzeojn.

“Tiu muzeo de *Pergamon* ja estas interesege”, diras Katrina. “Bedaŭrinde, ke vi ne povis kuniri! Sed vi sendube ofte vizitas ĝin.”

“Mi estis tie nur unufoje”, diras Franciska. “Ĝi ne tre interesas min.”

“Mi iris tien kelkfoje, kiam mi estis infano kaj junulo”, diras Bruno. “Tio estis devigaj vizitoj, kun la lernejo. Poste mi ne plu vizitis ĝin.”

“Do vi estas denaska berlinano, ĉu ne?”

“Jes ja”, respondas Bruno.

“Kaj ĉu vi ĉiam loĝas ĉi tie?” demandas Katrina.

“Ne vere. Mi faris iom strangan rondiron kaj revenis post kelkaj jaroj, pli-malpli al la sama urboparto.”

“Kial strangan?”

Bruno trinkas iom da biero kaj ridetas.

“Nu... tio estas longa rakonto, kaj eble teda”, li diras ne decideme. “Tamen, mi diru mallonge...”

Li pripensas dum kelka tempo. Eble li ne scias, kiel komenci. Franciska ekstaras kaj iras en la kuirejon. Bruno rigardas post ŝi.

“Ŝi jam aŭdis tion kelkfoje”, li diras. “Sendube ŝi trovas la rakonton teda.”

“Bone, sed mi ne aŭdis ĝin”, diras Katrina.

“Mi naskiĝis kaj kreskis ĉi tie”, komencas Bruno. “Do, en orienta Berlino. Mi ne interesiĝis pri politiko, sed subite kelkaj

amikoj komencis paroli pri ebloj iri okcidenten. Ankaŭ mi ekpensis pri tio. Mi havis dek naŭ jarojn kaj malmulte planis, mi simple vivis *nun* kaj *ĉi tie*. Tamen, oni diris, ke eblas iri de Hungario al Aŭstrio sen malfacilaĵo. Mi volis provi tion.”

“Ĉu fuĝi?” demandas Katrina.

“Nu, ĉe ni la vivo estis alia ol ĉe vi. Vi povis preskaŭ libere vojaĝi, eble ekloĝi en alia lando, reveni hejmen. Por ni ne estis tiel. Tamen, por mi la afero ne estis tute facila...”

“Ĉu ne estis danĝere?”

Bruno rigardas ŝin. El la kuirejo aŭdiĝas sonoj de manĝilaro kaj teleroj. Li diras:

“Mi ne sciis, ĉu estas danĝere aŭ ne. Sed mi pensis pri alia afero. Mi havis amikinson, kaj ŝi...”

“Ĉu Franciska?”

“Ne, ne” diras Bruno. “Tiam mi ne konis Franciskan. Ŝi sendube vivis en sia urbeto. Ne, temis pri alia knabino, sed ŝi ne tre volis kuniri...”

“Ĉu ŝi timis?”

“Eble. Aŭ simple al ŝi estis bone ĉi tie. Ne bone, eble, sed en ordo. Fine ni interkonsentis, ke mi iru sola, por provi, ĉu vere eblas. Poste ŝi sekvis min, pli malfrue. Do mi vojaĝis sola al Hungario kaj trovis iun, kiu povis montri al mi, kiel fari. Mi iris trans la limon. Mi kunportis nur etan sakon kun kelkaj aĵoj. Nenio malbona okazis, mi venis en Aŭstrion, kaj poste en okcidentan Germanion.”

“Jes? Kaj via amikino, ĉu ankaŭ ŝi iris?”

Bruno trinkas bieron kaj kapneas.

“Mi telefonis al ŝi. Kaj tiam ŝi rakontis, ke ŝi havos infaneton. Mian infanon. Mian filinon Sabine, kiu naskiĝis en la sekva jaro, kiam mi jam loĝis en okcidenta Germanio.”

Katrina miras. Ĉu do Bruno havas filinon?

“Ĉu via amikino ne kuraĝis iri trans la limon, kiam ŝi havos infanon?” demandas Katrina.

Bruno pripensas.

“Certe ŝi kuraĝis, sed ŝi ne volis. Ŝi preferis resti ĉi tie, kun la infano. Eble ŝi komprenis, ke ni ne vivos kune, nek ĉi tie, nek en okcidento.”

“Kaj nun? Kie ŝi loĝas?”

“En Berlino, ankoraŭ. Ne malproksime de ĉi tie. Poste la muro ja falis, kaj post kelkaj jaroj mi revenis al Berlino. Tiam Sabine havis tri jarojn. Nun ŝi jam estas dekdu-jara, kaj ni renkontiĝas de temp’ al tempo. Sed ni neniam loĝis kune.”

Katrina rigardas Brunon. Kial li neniam rakontis al ŝi, ke li havas filinon? Kial li ne rakontis, ke li vivas kun Franciska? Katrina ne komprenas lin. Kaj kial Franciska tiel bruas en la kuirejo? Ĉu ŝi ne ŝatas, ke Bruno rakontas pri sia filino kaj iama amikino?

Glosoj:

Aŭstrio ^Elando sude de Germanio / *Austria* / 오스트리아

babili ^Dparoli ne tre serioze / *chat* / 잡담하다, 수다떨다

biero ^Ĉmalforta alkoholaĵo el greno / *beer* / 맥주

de-naska ^Bjam ekde la naskiĝo / *by birth* / 태어나면서부터

de temp’ al tempo = kelkfoje, ne ĉiam / *now and then* / 수시로

dev-iga ^Atia, ke oni devas fari ĝin, ĉu oni volas aŭ ne /

compulsory / 의무의, 강제적인

fuĝi ^Dforkuri / *run away* / 도망가다

Hungario ^Elando oriente de Aŭstrio / *Hungary* / 헝가리

kap-nei ^Bnei per kapo / *shake one’s head* /

머리를 흔들어 부정하다

inter-konsenti ^Bkune decidi, havi saman opinion / *agree* / 동의하다

limo ^C	linio, kie io finiĝas (ekzemple lando) / <i>limit, boundary</i> / 경계, 국경
muzeo ^Ĉ	ejo, kie oni publike montras kolektojn / <i>museum</i> / 박물관
politiko ^Ĉ	regado de ŝtato / <i>politics</i> / 정치
rond-iro ^{BA}	rondan iradon/ <i>tour</i> / 한바퀴 돌기, 관광
sako ^C	ujo el mola materialo por kunporti aĵojn / <i>bag, sack</i> / 가방, 자루
sen-dube ^B	kredeble, preskaŭ certe / <i>no doubt</i> / 의심할바 없이
teda ^D	malinteresa / <i>boring, tedious</i> / 지루한

7. En urbeto

Hodiaŭ Katrina faras ekskurson ekster Berlinon kun siaj geamikoj. Ili iras per la malgranda aŭto de Franciska kaj Bruno. Kuniras ankaŭ Hannes, la frato de Franciska, do la eta *Renault* estas plenplena.

Franciska veturigas ilin en urbeton kun mallarĝaj stratoj kaj nealtaj domoj. Ili volas halti ĉe gastejo por manĝi. Ili lasas la aŭton apud muro, kie iu skribaĉis “FREMDULOJ FOR!”

“Ĉi tie mi ne rajtas halti”, diras Katrina.

“Kial ne?” demandas Bruno kun surprizo.

“Mi estas fremdulo, ĉu ne? Do mi devas foriri.”

Bruno silentas pro konfuzo, sed Hannes ekridas kaj diras:

“Ne timu! Ne temas pri svedoj!”

“Sed oni ne povas vidi, ke mi estas svedino”, diras Katrina.

“Vi kaj Franciska ŝajnas pli svedaj ol mi.”

La du gefratoj estas blondaj, kaj Hannes havas preskaŭ same longajn harojn, kiel lia fratino.

“Ĉu en via lando oni ne trovas tiajn skribaĉojn sur muroj?” demandas Franciska.

“Jes, certe”, respondas Katrina. “Sed mi kutime ne pensas pri ili. Tie mi ne estas fremdulo.”

La kvar geamikoj tamen lasas la aŭton kaj iras en la gastejon. Post kelka tempo Hannes klarigas super telero plena de manĝaĵo:

“Tiajn skribaĉojn oni vidas ĉie, en urbetoj kaj en urbegoj. Ne gravas, ĉu tie vere loĝas alilandanoj aŭ ne. Estas same en la urbeto, kie mi loĝas.”

“Tamen ne estis tiel, kiam ni estis infanoj”, diras Franciska. Poste ŝi klarigas al Katrina: “Hannes ankoraŭ restas en la urbeto, kie ni naskiĝis. Mi ne komprenas, kial.”

“Kaj mi ne komprenas, kial ĉiuj devas loĝi en urbegoj”, diras Hannes. Ŝajnas, ke la du gefratoj ofte kvereletas pri tiu temo.

“Ĉu viaj gepatroj ankoraŭ vivas en la urbeto?” demandas Katrina.

“Ne plu”, respondas Franciska. “Patro estas iama instruisto, kaj patrino laboris en vendejo, sed ŝi perdis la laboron. Ili ne plu povis zorgi pri propra domo. Ili ja havas sufiĉe da tempo, sed iliaj fortoj ne sufiĉas. Krome mia patro ne havas tre fortan koron. Do ili ekloĝis en pli komforta loĝejo en *Magdeburg*, kiu estas pli granda urbo. Tamen Hannes restas en la urbeto.”

“Nu, mi ja havas bonan laboron”, li diras.

“Pri kio vi laboras?” scivolas Katrina.

“Mi estas inĝeniero en fabriko.”

“Kaj ĉu vi havas propran familion?” Katrina plu demandas.

“Ne, tute ne. Mi estas libera!” li larĝe ridetas al ŝi.

“Vi certe restos ĉiam libera en tiu urbeto!” mokas lia fratino.

“Eble, eble ne!” respondas Hannes. “Estas tuta aro da simpatiaj knabinoj en la fabriko. Sed mi atendas la ĝustan...” Kaj li eĉ pli larĝe ridetas kaj okulumas al Katrina.

Glosoj:

ali-land-ano ^A.....homo el alia lando / *foreigner* / 외국인

fabriko ^Dejo, kie oni produktas per maŝinoj / *factory* / 공장

gasto ^Ciu, kiu vizitas iun / *guest* / 손님

inĝeniero ^Dteknikisto kun alta ekzameno / *engineer* / 기술자

komforta ^Ĉagrabla, ne ĝena aŭ laciga / *comfortable* / 편안한

konfuzi Ĉmalordigi / *confuse* / 혼란케 하다

kvereli^Ekolere kontraŭdiradi / *quarrel* / 말다툼하다,
논쟁하다

moki Ĉdiri ion ridigan pri iu / *mock* / 조롱하다

okul-umi ^B.....fari etan signon per la okulo / *ogle, wink* /
윙크하다

plen-plena ^Aplenega / *chock-full* / 가득한

surprizi Ĉmirigi per io neatendita / *surprise* / 놀라게하다

Renault.....nomo de franca aŭto [proksimuma prononco: renó] / 르노 자동차

Magdeburg.....[prononco: magdeburk] 독일 중부 작센안할트주에 속한 도시

8. Fantazia cigano

Hannes reiris al sia urbeto. Katrina vidis afiŝon pri koncerto, kiun ŝi ŝatus ĉeesti. Ludos grupo da ciganaj muzikistoj kun fama kantistino. Ŝi invitas Brunon kaj Franciskan iri kun ŝi al la koncerto.

“Ĉu vi aparte ŝatas ciganan muzikon?” demandas Bruno.

“Nu, ne aparte”, diras Katrina. “Tamen povus esti plaĉe. En mia lando mi ne ofte havas okazon aŭdi ion tian.”

La koncerto okazas en granda ejo. La publiko estas granda kaj multkolora, viroj, virinoj, infanoj, maljunuloj, homoj en ĉiaj vestoj. Katrina ridetas larĝe kaj ŝajnas ŝategi la etoson. Post kelka tempo ankaŭ Bruno kaj Franciska ŝatas la koncerton. La muziko estas bona kaj rapid-ritma, la kantado forta kaj plena de sentoj, la publiko tre ĝoja. Estas larmoj en la okuloj de Katrina. Ŝi nur bedaŭras, ke ne eblas danci.

Poste la geamikoj iras al restoracio. Bruno diras:

“Mi neniam ĉeestis similan koncerton. Ĉefe rok-muzikon mi kutimas aŭskulti. Kaj Franciska ĉiam aŭskultas klasikajn muzikaĵojn, ĉu ne?”

Li ridetas al sia amikino, kaj poste denove turnas sin al Katrina:

“Sed surprizas min, ke vi ŝatas tian muzikon. Mi pensus, ke svedoj ne ŝatas tiajn ritmojn kaj sentojn...”

Katrina ne scias, ĉu li ŝercas aŭ estas serioza. Ŝi iomete ruĝiĝas kaj respondas:

“Nu, verŝajne mi estas romantikulino.”

Ŝi faras paŭzon, sed kiam neniu alia ion diras, ŝi parolas plu, nun kun eĉ pli ruĝa vizaĝo:

“Se diri la veron, mi kutimas iom fantazii... Mi ne konas mian patron, ĉar...”

Denove ŝi konfuziĝas, kaj Bruno provas helpi:

“Ha, mi komprenas! Via patro estis cigano, kiu poste forkuris kun siaj parencoj!”

“Ne moku”, diras Franciska al li kaj poste demandas Katrinan:

“Ĉu vi eĉ ne scias lian nomon?”

Katrina kapneas, pensas dum momento kaj poste ek-rakontas:

“Estas tiel, ke mi havas tre junan patrinon. Ŝi tre ŝatas kanti, kaj kiam ŝi estis juna, ŝi studis muzikon ĉe ia lernejo. Nu, tie estis iu instruisto, kaj mia patrino enamiĝis al li kaj... poste aperis mi. Sed tiu instruisto tute ne volis havi infanon, aŭ eble li jam havis familion, do li neniam interesiĝis pri mi, nek plu pri Panjo. Kaj tial Panjo ne volas paroli pri li. Sed kiel infano mi multe pensis pri li, fantaziis. Kaj mi ja estas brunhara, sed mia patrino estas tre blonda, proksimume kiel vi, Franciska... Do, mi fantaziis, kiel vi diris, Bruno... Estas nur stulta infanaĵo... Sed kiam oni ne havas veran patron, oni ja devas fantazii, ĉu ne?”

“Mi komprenas”, diras Franciska. “Kaj do vi komencis interesiĝi pri cigana muziko, por iel vivi en tiu fantazio dum momento, mi pensas.”

“Jes, io simila”, diras Katrina dum ŝia vizaĝo malrapide rehavas normalan koloron.

Post la klarigo de Katrina, Bruno preskaŭ tute silentiĝas. Plu neniuj ŝercoj, neniuj mokoĵoj, neniuj seriozaĵoj.

“Kio okazis al vi, Bruno?” demandas Katrina maltrankvile.

“Nenio”, li respondas mallonge kaj restas en siaj pensoj.

Sed Franciska metas brakon ĉirkaŭ lin kaj diras, al li kaj al Katrina:

“Sendube vi pensas pri Sabine, ĉu ne? Tamen tute ne estas simila afero!”

Subite Katrina komprenas. Ankaŭ Bruno estas patro, kiu ne vivas kun sia infano. Ŝi diras:

“Jes, Bruno, tio estas tute alia afero! Vi ja renkontas vian filinon, ŝi ja konas vin! Vi ne estas ia fantazia cigano!”

Nun Bruno rigardas ŝin kaj ekridetas.

“Vi pravas, Katrina. Mi estas nek fantazia, nek cigano.”

Glosoj:

afiŝo ^Dgranda folio por informi aŭ anonci / *poster* / 포스터

cigano ^E(= romao) ano de Eŭropa popolo sen propra lando /
gypsy / 집시

en-am-iĝi ^B al.....ekami / *fall in love with* / 사랑에 빠지다

etoso ^Dspirita atmosfero / *atmosphere, ethos* / 분위기

fama ^Ckonata de multaj homoj / *famous* / 유명한

klasika ^Dmalnova, sed altkvalita, ne moda / *classical* / 고전의

koncerto ^Dmuzika prezento antaŭ publiko / *concert* / 콘서트

larmino ^Ĉakvoguto el okulo / *tear* / 눈물

muziko ^Ĉplaĉa kombino de sonoj / *music* / 음악

paŭzo ^Dnelonge haltigi agadon / *pause* / 정지하다

ritmo ^Dregula “batado” en muziko / *rhythm* / 리듬

roko ^Dŝtonego; usonstila muziko / *rock* / 바위, 락 음악

romantika ^Etia, ke sentoj regas / *romantic* / 낭만적인

serioza ^Cne ŝerca, grava / *serious* / 심각한

ŝerci ^Ĉdiri ion ridigan / *joke* / 농담하다

9. La krimo de Katrina

Du semajnoj pasas rapide. Morgaŭ Katrina revojaĝos hejmen. La tagoj en Berlino estis plenaj de okazaĵoj, vizitoj, ekskursoj, amikaj babiloj. Multe da ĝojo, sed ankaŭ iom da malĝojo. La tempo ne iĝis tia, kiel ŝi antaŭe atendis kaj esperis. Ŝia sonĝo en la ŝipo ne iĝis vera. La sonĝo, en kiu ŝi dancis kun Bruno kaj li kisis ŝin. Tiam ŝi ne sciis, ke Franciska staras inter ŝi kaj Bruno.

Hodiaŭ Katrina dum kelkaj horoj estas sola en la loĝejo de siaj geamikoj. Bruno kaj Franciska iris al granda vendejo, la sama vendejo, kie Franciska laboras, por aĉeti aĵojn al sia hejmo. Katrina pensas, ke ilia hejmo jam havas sufiĉe da aĵoj. Ŝi mem vivas multe pli simple en sia malgranda studenta loĝejo. Sed laŭ Franciska mankas multe da aferoj necesaj por vivi komforte. La tapiŝoj estas tro malnovaj, la kurtenoj havas malplaĉan koloron, kaj mankas kelkaj aparatoj en la kuirejo.

Subite sonoras la telefono. Katrina ne volas respondi, ĉar ŝi malbone parolas germane. Kaj ĉi tio ne estas ŝia hejmo. Sed poste ŝi pensas, ke eble Bruno telefonas por demandi pri la koloro de iu kurteno, aŭ por diri, ke ili revenos malfrue. Do ŝi levas la aŭdilon de la telefono.

“Ĉe Bruno!” diras Katrina en la parolilon. Ŝi ne volas diri “kaj Franciska”.

Unue estas silente, sed poste virina voĉo ekparolas germane. Katrina nenion komprenas. Ŝi provas klarigi, ke ŝi nur vizitas, ke ŝi estas fremdulo. “Fremduloj for!” ŝi pensas, sed ŝi ne diras tion. Ankaŭ la virino ne diras tion, sed ekparolas malrapide, pli klare.

Nun Katrina komprenas, ke la virino estas la patrino de Franciska. Katrina klarigas, ke Bruno kaj Franciska revenos hejmen post kelkaj horoj. Sed la patrino de Franciska ne povas atendi, ŝi ne povos telefoni pli malfrue. Ŝi kaj ŝia edzo ekvojaĝos ien. Katrina ne komprenas kien. Eble al iu parenco? Ŝi ankaŭ ne komprenas, dum kiom da tempo la gepatroj de Franciska estos for de sia hejmo. Sed ŝi promesas transdoni salutojn al Franciska, kiam ŝi revenos hejmen.

Post la telefona interparolo Katrina sentas maltrankvilon. Ŝi ne ŝatas ĉiam diradi “Bruno kaj Franciska”. Ŝi ŝatus iam diri “Bruno kaj mi”. Almenaŭ unu fojon.

Ŝi iras al proksima trinkejo, manĝas kolbason kaj trinkas bieron. Poste ŝi iras al alia trinkejo kaj trinkas duan bieron. Ŝi aĉetas bildkarton kaj skribas sur ĝi la nomon kaj adreson de amikino en Gotenburgo. Poste ŝi skribas: “Hieraŭ Bruno kaj mi ĉeestis koncerton. Estis tre bona vespero kun bona muziko. Ni multe dancis.”

Oni ja ne povas ĉiam skribi nur la tedan veron sur bildkartoj. Ofte malvero estas multe pli interesa.

Post kelkaj horoj ŝi reiras al la loĝejo. Estas vespero. Franciska kaj Bruno jam revenis. Ili aĉetis multajn aferojn.

“Via patrino telefonis”, diras Katrina al Franciska.

“Ĉu? Kial do? Ĉu io okazis?” demandas Franciska.

Katrina pensas dum kelkaj momentoj. Poste ŝi rigardas Franciskan kaj diras:

“Mi malbone komprenis. Vi scias... mia germana lingvo estas tre malbona. Sed... mi pensas, ke via patro estas malsana.”

Franciska tuj paliĝas.

“Ĉu li estas en malsanulejo?”

“Mi timas, ke jes. Ŝajnas al mi, ke ŝi diris ion pri malsanulejo.”

Franciska tuj provas telefoni al siaj gepatroj, sed neniuj respondas. Poste ŝi telefonas al sia frato, sed ankaŭ li ne respondas. Ŝi pensas, kaj poste diras:

“Ili certe estas en la malsanulejo de Magdeburg. Mi tuj iros tien.”

Ŝi rapide pakas vestojn kaj aliajn aĵojn en valizeton, kisas Brunon kaj foriras. Ŝi veturos per la aŭto kaj alvenos en Magdeburg malfruege vespere.

Poste Katrina rigardas, kiam Bruno malpakas kelkajn aferojn, kiujn ili aĉetis. Katrina diras, ke ili estas belaj kaj bonaj. Li diras:

“Nu, tio estis la ideo de Franciska...”

Bruno estas iomete malgaja, ĉar la patro de Franciska malsaniĝis. Kaj Katrina estas maltrankvila, ĉar ŝi diris malveron. Sed iom post iom ili pligajiĝas. Ili interparolas pri la festivalo, kie ili renkontiĝis. Kaj pri la hieraŭa koncerto. Katrina diras:

“Morgaŭ mi reiros hejmen. Ĉi tiu estos mia lasta nokto en Berlino. Sed vi devos viziti min en Svedio, ĉu ne?”

Bruno promesas iam viziti ŝin. Poste ili vespermanĝas. Tiu estas ilia lasta vespermanĝo kune, kaj ili dividas botelon da ruĝa vino. Neniu el ili diras “bedaŭrinde, ke Franciska ne estas kun ni”.

Katrina ĉiam memoros sian lastan nokton en Berlino.

Kaj ankaŭ la lastan matenon ŝi ĉiam memoros. Matenmanĝi duope kun Bruno! Kia ĝojo! Trinki kafon, kiun kuiris ŝi mem, neniuj aliaj. Rosti panon per nova panrostilo, kaj manĝi la panon kun marmelado. Longe sidadi ĉe la tablo dum amika babilado.

Tiam sonoras la telefono.

Katrina prenas plian kafon, kaj ŝia mano iomete skuiĝas dum Bruno levas la aŭdilon. Li parolas germane, kaj ŝi malmulte

komprenas. Ĉu li diris “malsanulejo”? Li ŝajnas tre maltrankvila. Sed neniu ja estas en malsanulejo. Katrina ja diris malveron!

Li remetis la aŭdilon kaj rigardas nenion. Nek Katrinan, nek la telefonon, nek ion ajn.

Poste li diras per malklara voĉo:

“Franciska akcidentis. La aŭto devojigis. Ŝi estas en malsanulejo. Ŝi havas tre gravajn vundojn kaj ne estas konscia.”

Glosoj:

akcidento ^D.....malfeliĉa okazaĵo / *accident* / 사고

de-voj-igi ^Bforiri de la vojo / *come off the road* / 길에서 벗어나다

kolbaso ^D.....erigita viando en besta intesto / *sausage* / 소시지

konscia ^Ctia, ke oni aŭdas, vidas, scias, kia estas la situacio /
conscious / 의식적인, 자각의

krimo ^Ĉ.....malbona ago, kiun oni punas / *crime* / 범죄

kurteno ^D.....tuko antaŭ fenestro aŭ pordo / *curtain* / 커튼

mal-san-ul-ejo ^B....ejo, kie oni flegas malsanajn homojn / *hospital* / 병원

marmelado ^Ddensa frukta konfitaĵo / *jam, marmalade* /

마아멜레이드, 잼의 일종

-ope ^Ĉen grupo(j) de, kune, (du-ope = du -oj kune) / *at a time, together* / 집합으로, 조가 되어 (du-ope :
2 인조로)

paki ^Cĉirkaŭvolvi aĵojn por transporto, meti aĵojn en valizon
/ *pack* / 짐을 꾸리다

pala ^Ĉ.....senkolora, heliĝinta / *pale* / 창백한

parencio ^C.....familiano (ankaŭ ne proksima) / *relative* / 친척

rosti ^Dprepari manĝon per varmega radiado / *roast, toast* /
굽다

tapiŝo ^Dteksaĵo sur planko / *carpet* / 양탄자, 카펫

vundo Ĉdifekto de la korpo / *wound* / 상처

10. Reen al nordo

Denove Katrina sidas en vagono. Sed nun la vagono iras al nordo. Katrina rigardas tra fenestro, sed ŝi ne vidas la domojn kaj kampojn de norda Germanio ekster la fenestro. Ŝi vidas nur la vizaĝon de Bruno, kiam li diris al ŝi “ĝis revido” en la stacidomo. Kaj ŝi vidas la palan vizaĝon de Franciska, kiam ŝi ekiris por serĉi sian malsanan patron en malsanulejo. Nun Franciska mem kuŝas senkonscia en tiu sama malsanulejo, pro la trompo de Katrina. Ŝi sentas grandan malvarmon en la brusto, kiam ŝi pensas pri tio.

Ankaŭ la disiĝo de Bruno kaj Katrina en la Orienta stacidomo de Berlino estis sufiĉe malvarma. Ili brakumis unu la alian. Sed neniuj kisoj. Bruno promesis iam viziti ŝin en Svedio. Sed li ne rigardis en ŝiajn okulojn, kiam li promesis tion. Certe li pensis pri Franciska. Eble li hontis pro la lasta nokto de Katrina en Berlino. Aŭ ĉu li komprenis, ke ŝi kulpas pri la akcidento de Franciska? Katrina ne kuraĝis rakonti al li pri sia trompo. Ŝi ne kuraĝis demandi, ĉu li hontas pro ilia nokto. Ŝi diris: “Donu miajn salutojn al Franciska, kiam ŝi vekiĝos.”

Poste ŝi prenis sian valizon kaj iris al la vagonaro, dum Bruno rapidis for por vojaĝi al Franciska en la malsanulejo. Katrina envagoniĝis kaj sidiĝis, kaj baldaŭ ŝi vidis la kajon malrapide foriri ekster la fenestro. Ĝi estis plena de homoj, kiuj mansignis al siaj amikoj. Ŝajnis al ŝi, ke en la vagonaro ĉiu homo krom ŝi havas amikon, kiu mansalutas de la kajo.

Nun ŝi do vojaĝas hejmen post la libertempo ĉe Bruno. Ne, ŝi ne plu rajtas pensi “ĉe Bruno”, ŝi devas pensi “ĉe Bruno kaj Franciska”. Subite ŝi sentas, ke Franciska devas resaniĝi. Kaj ke ĉio devos esti bona inter Franciska kaj Bruno. Ŝi sentas, ke ŝi devas

pagi ion pro sia kulpo. Post ĉiu krimo devas sekvi puno. Ŝia puno estos, ke ŝi ne havos lokon en la vivo de Bruno. Ŝi pagos Brunon al Franciska! Stulta penso! Sed ĝuste tiel ŝi sentas, ĉu stulte, ĉu malstulte. Dum unu nokto ŝi forigis Franciskan de Bruno per malbela trompo. Pro tio ŝi devos pagi al Franciska ĉiujn sekvajn tagojn kaj noktojn kun Bruno.

Ĉu do Bruno estas ia aĵo, per kiu oni pagas? Ŝi ridetas je la penso, kun larmoj en la okuloj. Sendube li povas decidi pri si mem. Ŝi ne povas doni lin al Franciska, kiel punpagon pro krimo. Li mem elektis Franciskan, ne Katrinan.

La vagonaro rapidas al nordo. Nun Katrina volas kiel eble plej rapide veni hejmen. Ŝi pensas pri sia eta loĝejo en Gotenburgo. Ŝi volus jam esti en ĝi. Kiam ŝi venos tien, ŝi telefonos al Bruno por ekscii, kiel fartas Franciska. Espereble ŝi resaniĝos. Ŝi devos resaniĝi!

Ĉu tiam Katrina kuraĝos rakonti al Bruno pri sia krimo? Eble jes, eble ne. Ŝi ankoraŭ ne scias.

Glosoj:

honti ^Chavi malagrablan senton pro faro de io malbona /
be ashamed / 부끄러워하다

kulpo ^Crespondeco de iu, kiu vole faris ion malbonan / *guilt* /
 죄, 과실

liber-tempo ^{BA}tempo, kiam oni ne laboras / *holidays* / 휴가

man-signi ^{AC}signi per mano / *make a sign, gesture* / 수신호, 제스처

man-saluti ^{AB}saluti per mano / *wave (in greeting)* / 손 인사

puni ^Ĉfari ion malagrablan kontraŭ iu, kiu faris krimon /
punish / 벌주다

pun-pago ^{ĈB}mono, kiun oni devas pagi pro farita krimo / *fine* /
벌금

sen-konscia ^Ctia, ke oni ne aŭdas, vidas, scias, kia estas la situacio /
unconscious / 의식을 잃은, 기절한

signo ^Cio, kio donas informon / *sign* / 표시, 징조

trompi ^Ĉvole erarigi iun / *deceive, cheat* / 속이다

Teknika postklarigo por instruantoj

La rakonto *La krimo de Katrina* celas prezenti facilan legaĵon al personoj, kiuj lernis la bazan Esperantan gramatikon kaj la plej bazan vortaron. Ĝi ne estas lernolibro, sed rakonto kun la intenco distri. La lingvaĵo en dek tre mallongaj ĉapitroj prezentas progresan defion al la leganto – alivorte: la unuaj ĉapitroj estas plej facilaj, la lastaj malplej. Ĉiuj ĉapitroj tamen uzas ĉefe simplajn, oftajn vortojn, facilajn gramatikajn formojn kaj frazojn kun simpla strukturo. La lingvaĵo konsistas el la praktike uzata, parolata, hodiaŭ vivanta Esperanto.

Ĉi tio estas la tria eldono de *La krimo de Katrina*. Aperis ankaŭ la rakontoj *Vojaĝo kun Katrina* kaj *Katrina malfruas*, kun simila enhavo kaj identa ĉefrolulino. Ĉiuj tri tamen estas sendependaj rakontoj.

Troviĝas kelkaj konataj klasigoj de baza Esperanta vortaro. Unu estas la Baza Radikaro de la Akademio, kun proksimume 2 500 morfemoj en naŭ grupoj. Dua estas la radikaro uzata por tekstoj *facilaj* kaj *tre facilaj* en la revuo Kontakto, kiu enhavas proksimume 1 000 morfemojn en du grupoj. Tria estas “665 plej oftaj morfemoj de parolata Esperanto”, ordigitaj laŭ ofteco, de Internacia Kultura Servo en Zagrebo.

Por uzo en ĉi tiu verko mi kombinis tiujn tri klasigojn kun du aliaj fontoj: la radikoj uzataj en kelkaj jam aperintaj “facillegaĵoj”, kaj la plej ofte aperantaj radikoj en aro da literaturaĵoj normalaj, ne facil-legaj. Surbaze de la ofteco de apero en tiuj kvin fontoj mi kreis klasigon en kvin grupoj A ĝis D.

A, la plej oftaj morfemoj, enhavas 197 morfemojn, B 258, C 269, Ĉ 349 kaj D 477; entute 1 550 morfemoj. Aldoniĝas grupo E = ĉiuj ceteraj radikoj en PIV, kaj F = ĉiuj ceteraj radikoj.

Sube mi montras la nombron de morfemoj el la grupoj A-F en ĉi tiu libro.

Grupo	A	B	C	C	D	E	F	Entute	Vortoj
Nombro	193	176	73	50	38	10	1	541	5 140

Post ĉiu ĉapitro mi glosis ĉiujn (nove) uzitajn vortojn el grupoj Ĉ-F, kaj ofte ankaŭ kelkajn aliajn.

La libreto do enhavas 541 diversajn morfemojn, el kiuj 442 estas inter la 724 plej oftaj morfemoj de Esperanto. Kiel komparon mi mencias, ke la konata *Gerda malaperis* de Claude Piron enhavas 750 diversajn morfemojn, tamen en teksto duoble tiel ampleksa kiel *La krimo de Katrina*.

Gramatike la ĉapitroj 1-2 konsistas nur el mallongaj ĉef-propozicioj kun as- kaj is-formoj de la verboj. Ekde ĉapitro 3 aperas malmultaj simplaj subpropozicioj (ĉefe kun ke), kaj os-formoj de la verboj. Us-formojn oni trovas ekde ĉapitro 4 kaj u-formojn ekde ĉapitro 5. Ekde ĉapitro 6 aperas la refleksivo sia, pli multaj sub-propozicioj kaj iom pli longaj frazoj. Participoj entute ne aperas.

La vortordo kaj frazkonstruo estas simpla, sed mi ne evitis ne-kompletajn frazojn, tipajn de buŝa lingvaĵo. La celo estas, ke la leganto renkontu facilan vivantan lingvon.

Sten Johansson

Verkoj de la aŭtoro

Originalaj:

Denaska kongresano (novelaro, 1992)
Ĝis revido, krokodilido! (novelaro, 1996)
Interkona mateno (teatraĵoj, 1996)
Mistero ĉe Nigra Lago (romaneto por infanoj, 1997)
Falĉita kiel fojno (krimromano, 1997)
Trans maro kaj morto (krimromano, 1999)
Neĝo kaŝas nur... (krimromano, 2001)
La krimo de Katrina (facila rakonto, 2001)
Dis! (romano, 2001)
Kion ajn (facila rakonto, 2002)
Vojaĝo kun Katrina (facila rakonto, 2002)
Memor' mortiga (krimromano, 2003)
Katrina malfruas (facila rakonto, 2004)
Pasteĉo (25 beletraĵoj stilpastiĉoj, 2005)
Amaro (novelaro, 2005)
Kroze – proze (literatura esearo 2013)
Marina (romano 2013)
Skabio (romano 2015)
Kiam la vento turniĝos (bit-libra novelaro 2015)
El ombro de l' tempo (romano 2017)
Marina ĉe la limo (romano 2018)
Ne eblas aplaŭdi unumane (romano 2019)
Sesdek ok (romano 2020)
Secesio (romano 2021)
Falaflo en maco (romano 2023)
La nepo de Marina (romano 2023)

Tradukitaj:

- Hjalmar Söderberg: La kiso (novelaro, 1995)
- Pär Lagerkvist, Eyvind Johnson, Harry Martinson: Nobela novelaro (1995)
- Torgny Lindgren: La beleco de Merab (novelaro, 1995)
- En la realo troviĝas truo (nuntempa sveda novelarto, 1996)
- Torgny Lindgren: La vojo de serpento sur roko (romano, 1997)
- Benjamin Jacobsen: Inter tero kaj ĉielo (facil-legaj noveloj, 1997)
- Carl Jonas Love Almqvist: Tio konvenas! (romaneto, 1998)
- Hjalmar Söderberg: Doktoro Glas (romano, 1998)
- Hjalmar Söderberg: La peltó (novelaro, 1999)
- August Strindberg: Sonĝodramo (dramo 1999)
- Selma Lagerlöf: La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson (2002)
- August Strindberg: Insulanoj de Hemsö (romano, 2005)
- Hjalmar Söderberg: La serioza ludo (romano 2016)
- Frans G. Bengtsson: Orm la ruĝa, volumo 2. Hejme kaj en Oriento (romano 2019)
- Tove Jansson: Kometo en Muminvalo (infanlibro 2022)
- Tove Jansson: Ĉapelo de sorĉisto (infanlibro 2023)
- Tove Jansson: Memoroj de Muminpatro (infanlibro 2023)

La krimo de Katrina

2023. 11. 1 발행

저자 : Sten Johanssen

발행자 : 이중기

발행처 : 서울 에스페란토 문화원

서울특별시 중구 삼일대로 305,

명동 데스빌딩 601 호

(우) 04537

문화원 : www.esperanto.kr

문화원 서점 : www.esperanto.name

메일 : leejungkee@khu.ac.kr

정가 : 5000 원

Rakontoj pri Katrina

Katrina estas juna instruistino en Svedio, kaj tri rakontoj pri ŝi en facila Esperanto konvenas por tiu, kiu scias la plej bazan vortaron kaj gramatikon. La tuta rakonto estas verkita en facila lingvaĵo, sed plej facila ĝi estas en la komencaj ĉapitroj. Post ĉiu ĉapitro sekvas klarigoj de malpli facilaj vortoj.

La libreto ne estas lernolibro, sed prezentas facilan legaĵon por ĉiu, kiu volas uzi siajn akiritajn sciojn de Esperanto por legi distran rakonton.

La krimo de Katrina - unua rakonto -

temas pri vojaĝo de Katrina al Berlino por serĉi sian amon de la antaŭa jaro, sed ne facilas trovi ĝin sen fari krimon!

Vojaĝo kun Katrina - dua rakonto -

temas pri Katrina kaj ŝiaj lernantoj, pri vojaĝo de Gotenburgo al Bjalistoko, pri serĉado kaj sopiroj. Sed unue kaj laste ĝi temas pri *amikeco* inter junaj homoj.

Katrina malfruas - tria rakonto -

temas pri la klopodoj de Katrina formi sian vivon kun amo, laboro kaj familiaj rilatoj. Kial ŝi ĉiam ripetas la eraron de sia patrino? Kaj kial la patroj emas malaperi?